



Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 2 Februaro, 2011

№ 75

75 estas la ĝusta numero de tiu ĉi eldono de nia bulteno. Jes, kara leganto, dum pli ol ses jaroj, ĉiumonate vi havis, havas kaj, espereble, havos eblecon legi ion interesan, okazintan en La E-Societo de Ŝikago. Ni eĉ ne povis imagi en la fora Novembro de 2004, kiam d-ro Kordylewski proponis al nia teamo renaskigi la eldonon, ke ni ĝisvivos tiun tempon. Sed okazis neimagebla, kaj la 75-a numero de nia kara "Saluton!" ekaperis antaŭ viaj okuloj. Do, kiel kutime, ĝuu legadon! Sanon kaj feliĉon al niaj legantoj! Hodiaŭ al vi estas proponata nova-malnova poemo de G. Dolgin, resumo de la lasta kunsid-prelego (L. Kordylewski) kaj informo de E-USA.

Bv anonci vian partoprenon en la sekvanta kunsido por ricevi hejman taskon por la traduk-klaso: ni esperantigos anglan rakonton. Sukcesojn!
-La Redakcio

Antaŭ la Tago de Sankta Valentino

de Gregory S. Dolgin

*Sub sun' februara briletis glaci-diamantoj.
El regno de l' vintro, el neĝ' antaŭ via rigard'
Aperis ne iu strangul' kaj ne preteriranto,
Sed longatendito, pri kiu vi revis kun ard'.
La lipoj tremetis kaj flustris pri io konsternate,
Kaj Vi eĉ ne kaŝis la timon, ke iros mi for.
Vi ŝajnis al mi diafana, konfida sincere,
Per Sun' tralumita ja kvazaŭ glacia amfor'.*



*Turniĝis la arboj, miksiĝis real' kun fabelo
Pro neĝ' februara, pro vent' inter nuda branĉar'.
Ho, kiel kares' ne sufiĉis por ni, mia belo! -
Kaj ĉu humiliĝos ni al la disiĝa amar'?'
Pardonu, mi foris - aliel ne povis mi. Tamen
Ne estos bridita de iu hazard' nia sort'.
Se trovis la princ' sian bel-aminon, mi same,
Mi nepre Vin trovos kaj regos feliĉ' en konkord'!*

Bahaa Kredo

Unu el la unuaj usonaj esperantistoj, kun kiuj mi konatiĝis tuj post mia enmigro en Ŝikagon antaŭ preskaŭ 30 jaroj, estis s-ino Janet Bixby. Ŝi ne nur aktivis en nia movado, sed ŝi estis ankaŭ fervora bahaano. Tuj post mi aĉetis mian unuan usonan aŭton, ni kune faris ekskurson al la norda antaŭurbo Wilmette. Tie, ĉe la bordo de la lago Miŝigan, troviĝas la Bahaa Templo, kiun Janet nepre deziris montri al mi. Kvankam mi neniam poste fariĝis bahaano, min tuj impresis la eksterordinareco de la templo. Mi favore ekinteresiĝis pri la bahaa religio kaj ekkonis ĝiajn ligojn kun Esperanto.

La templo en Wilmette estas unu de nur sep ĉefaj bahaaj adoroj, ekzistantaj en la nuntempa mondo kaj la unusola en Norda Ameriko. Oni volis havi po unu en ĉiu kontinento. Kvankam ĉiu el la mondaj temploj karakteriziĝas per propra specifa stilo, ili havas komunajn trajtojn: rondaj ĝardenoj ĉirkaŭas la naŭangulan centran konstruaĵon, kiun kovras majesta kupolo. La bahaaj temploj celas simboli unuecon de ĉiuj homoj kaj religioj sub unu Dio. Neniu direkto estas privilegiata: malsame al



la aliaj sanktejoj la simetrio de ĉiu bahaa templo estas radia (ne duflanka). La bahaaj temploj ofte similas la formon de floro (la hinda konstruaĵo estas nomata Lotosa Templo). Kune kun la florabundaj ĝardenoj kaj lagetoj la temploj emfazas ligan de religio kun naturo.

La templo en Wilmette estas listigita en la registro de usonaj historiaj lokoj kaj estis nomita unu el sep gravaj vidindaĵoj en la ŝtato de Ilinojso. Ĝia inaŭguro okazis en 1953 post pli ol 30 jaroj de konstruado. Franca-kanada arkitekto Louis Bourgeois laboris dum ok jaroj por krei la projekton ĝustan por tiu impona celo. La betonaj paneloj estis kreataj el miksaĵo de kvarcaj kristaloj kun blanka cemento por akiri finezian brilan surfacon de la konstruaĵa ekstero. Centoj da detale kalkulitaj kaj precizigitaj fragmentoj estis pendigitaj sur

la fera skeleto de la templo.

La bahaa kredo estas praktikata tutmonde de pli ol 5 milionoj da homoj de preskaŭ ĉiuj nacioj kaj etnaj devenoj. La bazaj principoj de la bahaa kredo inkluzivas forigon de ĉiuj formoj de antaŭjuĝo, egalecon inter viroj kaj virinoj,

harmonion de scienco kaj religio, mondan pacon prizorgatan de monda registaro, spiritbazitajn solvojn de ekonomiaj problemoj, kaj universalan edukadon. Bahaanoj kredas, ke la mondo devus havi unu komunan



lingvon. Rezulte, multaj bahaanoj en la mondo estas esperantistoj, aŭ almenaŭ favoras la ideojn de nia movado.

Bahaanoj kredas, ke dum la historiaj tempoj Dio manifestis sin al la homaro pere de pluraj “Mesaĝistoj de Dio”, vivintaj en la fora pasinteco, kiel Abrahamo, Moseo, Kriŝno, Budho, Zoroastro, Kristo kaj Mahometo. La misioj de tiuj “Mesaĝistoj” formas la sinsekvajn etapojn en la spirita evoluo de la civilizacio. La fondinto de la bahaa religio Bahá'u'lláh (1817-1892) estas rekonata de la bahaanoj kiel la lasta de la “Mesaĝistoj” promesita por nia epoko. La nomo de la fondinto Bahá'u'lláh signifas “Splendoro-Gloro-Lumo de Dio”. Simile al Jesuo Kristo, kiu fondis kristanisman en la mezo de la juda nacio de kies prosekuto li suferis, Bahá'u'lláh pasigis la plejmulton de sia vivo inter mahometanoj. Pro la instruado de lia nova religio, Bahá'u'lláh vivis longtempe kiel malliberulo aŭ ekzilito. En la jaro 1868 li estis malliberigita en palestina Akká (Acre en nuntempa Israelo), kie li mortis en la jaro 1892. La sanktaj lokoj de bahaanoj estis detruitaj en Irano, dum laŭ la dezirio de Bahá'u'lláh, la centro de lia religio troviĝas en la regiono de Akká-Haifa, kie oni entombigis lin.

Inter la famaj bahaanoj troviĝis filino de D-ro Esperanto, Lidia Zamenhof, kiu pereis en la nazia koncentrejo dum la lasta mondmilito. Pri ŝia laboro por Esperanto kaj baha religio aperis libroj en Esperanto kaj angla lingvoj [Wendy Heller, Lidia: La vivo de Lidia Zamenhof, filino de Esperanto (ISBN 978-90-77066-36-2)].

Dum mia lasta vizito en la templo en Wilmette mi rimarkis ke abundas tie multlingvaj informiloj, dum mankis io ajn en Esperanto. Danke al la komuna fortostreĉo de nia Esperanto-Societo (kunlabore kun la fakdelegitoj de UEA pri Bahaismo) ni preparis la kolorilustritan informbroŝuron en Esperanto, kiun ni donacis al la templo en Wilmette por distribuo inter la interesitoj. Mi esprimas ĉi tie miajn varmajn dankojn al ĉiuj kunlaborantoj kiuj kontribuis al tio.

—D-ro Les Kordylewski

NASK 2011: Sama Kurso en Nova Vesto!

La Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK) ŝanĝas la formaton de la 42-a sesio en 2011: anstataŭ la tri-semajna daŭro, NASK okazigos mallongan sesion de nur sep tagoj de intensa instruado dum la usona feria semajno de la 2-10-a de Julio. La loko – la sunplena kampuso de la Universitato de Kalifornio, San Diego (UCSD) – restas la sama. Ĉiu inter la aĝoj 16 kaj 96 (aŭ eĉ pli) de ĉie en la mondo estas bonvenaj!

Ĉi-jare estas rabatita prezo por ĉiuj, kiuj aliĝos antaŭ la 15-a de marto (865 USD), kaj estas aparta prezo por plentempaj studentoj kaj latin-amerikanoj (665 USD antaŭ la 15-a de marto), ĉio inkluzivita. Pli da detaloj kaj fotoj troviĝas ĉe: <http://esperantic.org/nask>; informoj pri prezoj kaj pag-manieroj: <http://esperantic.org/eo/edukado/nask>. Por informoj pri registriĝo, stipendioj ktp., kontaktu la administranton, Ellen Eddy: eddyellen@aol.com.



Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – D-ro Les Kordylewski
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;
Familia membro: \$30,
Regula: \$20
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library
4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL
Kunvenoj komenciĝas
je 7 p.t. en la Suda
Konferenca Salono, unua etaĝo.**

SEKVANTAJ KUNSIDOJ

22an de Februaro – tradukarto, E-versioj de T. Ŝevĉenko poemoj okaze de 150-jara datreveno de lia morto (majstroklason gvidos certigita tradukisto)

26an de Aprilo – Bill Mania: “Vankuvero”

...26an de Junio – tradicia pikniko